

Kulturdomo de Esperanto, 1310 route du Lude - Grésillon, 49150 Baugé en Anjou, Francujo
Civila kooperativa societo kun variebla kapitalo, registrita en Angers je n-ro 522 621 556.

KUNVOKILO al la Jarkunsido la 21-an de aprilo 2024 je la 9a 00

La jarkunsido okazos dimanĉon, la 21-an de aprilo 2024 inter la 9a kaj 12a horo. Ĝi okazos hibride, ĉeeste en Greziljono kaj rete/aŭdvide. Vidu la tehnikajn detalojn sur la antaŭlasta paĝo. Se vi ŝatos tagmanĝi en Greziljono, bonvolu kontakti nin almenaŭ 1 semajnon antaŭe.

La voĉdonoj okazos rete (per la retejo balotilo.org), antaŭ kaj dum la kunsido, kaj ĝis dimanĉo noktomeze, tiel ke ĉiuj ĉeestantaj societanoj povu kalkuli kun la efektive okazinta debato por voĉdoni. Societano, kiu ne povas aŭ ne volas voĉdoni per la retejo balotilo.org, Bonvolu sendi sian voĉdonilon per poŝto aŭ retmesaĝo (tiel, ke ĝi alvenu plej malfrue ĵaŭdon la 18an de aprilo). Vidu instrukcion sur la antaŭlasta paĝo.

Tagordo

- 1) Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) Nombrado de la ĉeestantoj,
- 3) Evoluo de la nombro de la societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) Agadraporto 2023,
- 5) Financa raporto 2023,
- 6) Aprobo de la kontoj de la jaro 2023,
- 7) Imputo de la profito 2023,
- 8) Buĝeto 2024,
- 9) Kvitigo de la Komitato,
- 10) Prezento de la kandidatoj
- 11) Rezolucio: profesiigo de la mastrumado de ludonoj
- 12) Programo 2024,
- 13) Aliaj demandoj.
- 14) *La rezulto de la voĉdonoj estos konata lundon frumatene,*

3) Evoluo de la nombro de societanoj

La nombro de societanoj iomete kreskis: 254 la 31-an de decembro 2023 (kontraŭ 251 fine de 2022), kun 864 societaj partoj A (po 16 €) kontraŭ 855 partoj fine de 2022, danke al 10 novaj societanoj kaj malgraŭ 5 forpasoj, 2 fordonoj de partoj. La nombro de partoj B (po 200€) malaltiĝis: 3 societanoj ricevis repagon, kio malkreskigis nian societanan kapitalon.

4) Agadraporto 2023

Ni daŭrigis nian kutiman agadon dum la tuta jaro 2023. Ni daŭrigis la renoviglaborojn, kiujn ni entreprenas de pluraj jaroj, kaj ankaŭ la plibeligon de la bieno.

La ludonojn kaj la staĝojn prizorgis administrantoj kaj aliaj volontuloj. La kuiradon, purigadon kaj servadon prizorgis ĉefe Christelle Perrot, 6 aliaj okazaj dungitoj kaj volontuloj.

En la jaro 2023, la kastelo estis okupata dum 206 tagoj, t.e. 56 % de la tempo: 71 tagoj de esperantistaj eventoj, 14 tagoj de ne-esperantistaj eventoj, 101 tagoj de ludonoj, 20 tagoj de volontulaj laboroj kaj 4 tagoj por la jarkunsido kaj komitatkunvenoj (ofte distance). Inter januaro kaj decembro, 42 el la 52 semajnfinoj estis okupataj. Vidu la agadon rete ĉe: gresillon.org/a2023.

- De la 23-a ĝis la 25-a de marto, kurso pri jogo kaj akvarelo kunigis 16 homojn.
- De la 14-a ĝis la 23-a de aprilo, la 11-a staĝo Printempas kunigis 39 homojn el 8 landoj.
- De la 24-a de aprilo ĝis la 1-a de majo, la ĥora staĝo de Interkant kaj virina koruso kunigis 26 homojn.

La someraj staĝoj okazis dum 36 tagoj en julio kaj aŭgusto., ili kunigis 246 homojn.

- De la 3-a ĝis la 7-a de julio, la 4-a Verda Semajno de Naturismo kunigis 15 esperantistojn kaj naturistojn.
- De la 7-a ĝis la 17-a de julio, la 7-a Maratona Esperanto-Kurso paralele kun la 35-a Internacia Esperanto-Konferenco kunigis 35 homojn el 6 landoj.
- De la 18-a ĝis la 25-a de julio, la 96-a SAT-Kongreso kunvenigis 53 homojn el 9 landoj sur 3 kontinentoj.
- De la 25-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, la 44-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj paralele kun la renkontiĝo de la Verdaj Skoltoj kunigis 73 homojn, inter kiuj 35 infanoj kaj 12 gejunuloj.
- De la 7-a ĝis la 17-a de aŭgusto, la 9-a semajno de reciproka interŝanĝo de scioj kaj scipovoj kunigis 60 homojn.
- De la 28-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro, studsesio kun Christian Rivière kunigis 10 homojn.
- De la 16-a ĝis la 22-a de oktobro, la staĝo de ĥora kantado de Interkant kaj de argentina tango kunigis 22 personojn.
- De la 23-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro, la 12-a staĝo Aŭtunas kunigis 36 homojn, inter kiuj 8 infanoj kaj 2 gejunuloj

Sume, en la jaro 2023 dum la 76 tagoj de staĝoj ĉeestis 369 homoj, nova rekordo (309 en 2022, 209 en 2021, 205 en 2020, 275 en 2019) kun 7 087 manĝoj kaj 2 609 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de la staĝoj preskaŭ ne plialtiĝis de dek du jaroj kaj ke duon-tarifo validas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malaltaj vivrimedoj, celante instigi esperantistojn al vizitado. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn.

Ludonoj

Jam la dekunuan jaron la Kulturdomo financas sin per ludonoj al privatuloj. Entute realiĝis 38 ludonoj, el kiuj 11 dum la labortagoj. Krome, la ĉambro 37 alirebla per rulseĝo estis ludonata 12-foje al privatuloj.

La komerca disvolviĝo atingas rezultojn, tamen necesigante novspecan mastrumadon. Ni bezonus personon por certigi permanentadon de ludonoj (kiel Ron).

Konstrulaboroj kaj bonteno de la bieno

Dum 20 tagoj dediĉitaj al laboroj, kaj ankaŭ dum la ludonoj kaj staĝoj, ni daŭrigis la plej diversajn laborojn:

La muroj de la unua etaĝaj koridoroj estis farbitaj per hela tufa koloro. Muro en la kuirejo estis farbita.

La ampoloj kaj neonaj lumoj estis anstataŭigitaj per LED-ampoloj kaj la 2 enirejaj murlampoj estis renovigitaj.

La muelila necesejo de la ĉambroj 35 kaj diversaj kranoj kaj tuboj estis anstataŭigitaj.

La interreta kablo (RJ45) estis instalita ĝis la klasoj B kaj C.

La ekstera pordo kun panikostango de la 2-a etaĝo estis anstataŭigita.

La orienta kampadejo estis liberigita de la radikoj de la malaltaj kverkoj invadaj (inter oktobro kaj marto)

La lageto estis malplenigita de plantoj kiam ĝi estis preskaŭ malplena en somero. (Februarfine la lageto tro plenis).

En julio, trinkakva liko estis konstatita kaj riparita apud la rivereto Altrée. Fine de oktobro laboro estis engaĝigita por konekti Greziljonon al la publika kloakreto kaj por samtempe instali novan trinkakvotubon. Tiu laboro estis farita dum januaro 2024. La alirvojo inter la strato Route du Lude kaj la kastelo estos renovigata antaŭ la somero 2024 per duobla tavolo kaj fina poluro el blua gruzo.

Koncerne la grandan projekton de la kastelaj tegmentoj, la parto super la biblioteko kaj la salono estis renovigita en junio kaj julio 2023. La parto super la manĝejo 1 estis renovigita en marto 2024. Aliaj konstruadoj estas atendataj.

Ni danku al Bert Schumann, Emmanuel Morin, René Jelenc, Frédéric Lauriol, Alain Descarpentries, François Lo Jacomo, Ugo de Maubeuge, Claudie et Dominique Bureau, Maurice Raucy, Armelle Piolat, Jannick Huet, Lupinardo kaj Leja, kiuj partoprenis tiujn volontulajn laborojn en 2023.

5) Financa raporto 2023

En ĉi tiu jaro 2023, la kutimaj enspezoj de la kulturdomo sumiĝis je:

- staĝoj 72 986 € (53 396 € en 2022)
- semajnfinaĵoj 84 754 € (103 618 € en 2022)
- labortagoj 16 407 € (14 975 € en 2022)
- hotela metio: 2 235 € (1 708 € en 2022)

Ekzameno de la kontoj montras, ke ĉi tiu spezo ebligis kompensi la funkciadajn kostojn.

Donacoj malaltiĝas al 2 958 € (4 823 € en 2022).

La profito atingas 68 511 € post imposto kompare kun 65 256 € en 2022.

La laboroj sur la tegmento daŭris por 38 549 € kaj 13 412 € estis antaŭpagitaj por la realigo en januaro 2024 de la konekto al la kloako.

Pri la disponeblaĵoj, je la 31a de decembro 2023 ni havas entute 382 691 €, el tio 8 754 € en ĝirkontoj, 351 150 € en ŝparkontoj, 4 504 € en UEA, 18 214 € en societaj partoj de la Banque Populaire kaj 69 € kontante en la kaso.

La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) estas publikigitaj en nia retejo, aparte de la jena kunvokilo.

6) Imputo de la profito 2023

Konforme al nia statuto, ni proponas al vi aprobi la jenan imputon de la profito en 2023:

- Profito neta post imposto: 68 510,61 €
- Imputo al la leĝa rezervo 15 %: 10 276,59 €
- Pago de interezoj je societaj partoj B: 4 498,10 €
- Dividendo al societanoj: nenio
- Altigo de kapitalo: nenio
- Fonduso por disvolviĝo: 53 735,92 €

10) PREZENTO DE LA KANDIDATOJ

La 21-an de aprilo 2024 okazos nia jarkunsido kun elekto de duono de la Administra Komitato. La kvin komitatanoj finantaj sian periodon estas: Esperanto-Francio, SAT-Amikaro kaj Pierre SOUBOUROU (reelekteblaj), Xavier GODIVIER kaj René JELENC (ne reelekteblaj.) Restas elektitaj ĝis 2026: Elisabeth BARBAY, Alain DESCARPENTRIES, Pierre DIEUMEGARD, François LO JACOMO kaj Bert SCHUMANN. Ni ricevis kvin kandidatiĝojn por kvin postenoj. Jen la kandidatoj:

Pierre SOUBOUROU "Ŝtonĉjo"

Naskiĝinta la 22an de Aprilo 1980, mi estas inĝeniero pri sekureco, kaj mi malkovris Esperanton je aĝo 12.

En la pasinta mandatperiodo, mi administris la aktivecon "Luado" kun Jannick HUET, kaj laborigis lernuservantojn kaj esperantistan staĝanton, por progresigi kaj efektivigi la komercan strategion, kaj disvolvi komunikajn kaj mastrajn ilojn. Tio jam kreis profiton por la kastela buĝeto. Plie, ni reprenis la aktivecon "Mastrumado", kiun ni stabiligis per kreo de posteno.

Mi rekandidatas al la Greziljona AK de 2024 por subteni la rezoluci-projekton "profesiigo de la mastrumado de ludonoj" kiu intencas konstitui skipon de volontuloj, lastinstance de entreprenoj, por establi plurajn disvolvajn opciojn, cele al potencialhava klientaro kaj en la intereso de la esperantistaj agadoj. Ĉiu opcio detaliĝos per teĥnika-ekonomia analizo por permesi de la societanoj kleran elekton por efektivigo.

Francis BOSCH

Mi naskiĝis la 9an januaro 1952, estas emerito (mi estis inĝeniero pri elektroniko, okupiĝanta principe de patentoj pri inventoj), Mi komencis lerni Esperanton antaŭ 45 jaroj. Post paŭzo, mi rekomencis lerni la lingvon kun mia familio ekdeŭ 2 jaroj. Mi eble havas la nivelon B1.

Mi estas societano ekde 1 jaro, mi aparte interesiĝas pri kulturo, biblioteko kaj libroservo, pri eksteraj spacoj, kastelkonstruaĵoj, subvencioj. Kompreneble, mi ŝatus helpi la Kulturdomon je ajna alia tasko konfidita al mi.

SAT-Amikaro

La asocio SAT-Amikaro (Unuiĝo de franclingvaj esperantistaj laboristoj) ree kandidatas por ĉeesti la komitaton. Kiel kultura progresema asocio, kongrue kun sia statuto, ĝi apogos sin sur la riĉaĵo, kiun konsistigas la Kulturdomo por kontribui al la reciproka disvolvo de ambaŭ strukturoj, je la intereso de ĉiuj esperantistoj, kaj precipe de la plej malfavorataj. Ĝi do aparte zorgos, ke la tarifoj de staĝoj ebligu partoprenon de kiel eble plej multaj interesatoj, eĉ tiuj pagrilate limigitaj.

Ĝi ankaŭ celas apogi projektojn, kiuj malfermas la bienon al homoj, esperantistoj kaj ne, kiuj konsentas kun niaj valoroj pri kritika menso kaj popola edukado.

Ansofi Markov reprezentos nian asocion.

INOE

Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) estas faka asocio kunlaboranta kun Universala Esperanto-Asocio. INOE estis fondita en 1961 por kunigi kaj disvolvi naturismon kaj Esperanton. Ĝi kunligas naturistajn esperantistojn kaj publikigas ĝian bultenon "Naturista Vivo" kvarfoje jare.

Ni organizas la Naturisman Verdajn Semajnojn ĉiun someron jam de kvin jaroj. Tiu evento plene kongruas kun la valoroj de Esperanto kaj naturismo. Ĝi estas kaj Esperanto-instruesio kaj internacia renkontiĝo de esperantistaj naturistoj. Pro tio, ĝi ankaŭ baziĝas sur la valoroj de naturismo: respekto de si mem, de aliaj kaj de la medio danke al la praktiko de komuna nudeco. La kastelo Greziljono estas tute taŭga loko ne nur por organizi naturistajn aranĝojn sed ankaŭ por evidenti la rilaton inter la valoroj de Esperanto kaj tiuj de naturismo.

INOE subtenos la principojn de la kooperativo: subteni Esperanton per ĉiuj taŭgaj rimedoj kaj samtempe sekurigi la estontan daŭrecon de la operacio de la Kastelo.

Interkant

INTERKANT estas asocio kreita de esperantistoj por ĥora kantado en Esperanto. Ekde 2022, ĝi havas sian sidejon en Greziljono.

Ekde 2014, ŝi organizas siajn kursojn (ĥorprovojn) en Greziljono ĉiujare en aprilo-majo kaj oktobro-novembro. Interkant regule proponas koncerton komunan kun najbaraj korusoj en Baugé en Anĵuo.

Niaj ĥoristoj (ĉirkaŭ dudek) uzas la kutimajn procedurojn de aliĝo kaj financa partopreno kiel por aliaj staĝoj organizitaj de la Kulturdomo.

11) REZOLUCIO

La jarkunsidon de la 13a de majo 2023 sekvis debato pri la komerca politiko de Greziljono, kies raporto estis alŝutita apud la protokolo mem de la jarkunsido. Neniu estis voĉdonita ĉar neniu rezolucio estis proponita en la tagordo. Ĉi-jare, pluraj komitatanoj redaktis la ĉi-suban rezoluci-proponon, kiu estos voĉdonata dum la jarkunsido de la 21a de aprilo 2024.

Rezolucio: profesiigo de la mastrumado de ludonoj

Ĉu vi favoras intensigi ludonojn de la kastelo dum la labortagoj kun la celo financi la profesiigon de ties mastrumado kaj la realigon de plibonigaj projektoj?

Argumento por:

La komerca evoluo de la MCE ebligis starigi bonan financon aŭtonomecon, kiu ebligis al ni dum kelkaj jaroj plenumi esencajn prizorgajn kaj renovigajn laborojn, precipe tegmentojn. Ni tamen rimarkas, ke kvankam la komerca funkciado estas nuntempe tre enspeziga, ĝi dependas tro de manpleno da volontuloj kaj pli precipe de unu volontulo, kiu sola efektivas multe pli ol 50% de la laboro necesa por la rezultanta ĉiutaga administrado.

Por povi certigi la daŭripovon de komerca funkciado kaj la rezultajn profitojn, ni konsideras, ke necesas studi la eblecon profesiigi komercan mastrumadon. Ĉi tio kompreneble kreus kromajn kostojn. Tial ni konsideras, ke necesas samtempe studi la eblecon pligrandigi la merkaton de Greziljono, disvolvante ĝian uzadon dum la tuta jaro dum semajnfinoj kaj dum la labortagoj. Por resti kiel eble plej fidelaj al la statuto de la MCE, ni favoros luojn ligitajn al popoledukaj agadoj.

Ĉi tiu vojo ŝajnas al ni dezirinda por provizi pli da financado ebiganta kaj pagi dungitojn kaj financi la daŭrigon de la laboroj por daŭrigi la prizorgadon kaj renovigon de la kastelo sed ankaŭ por povi konsideri adaptadon kaj transforman laboron por kontentigi la bezonojn de ĉiuj uzantoj de la loko. Pli da profesiigo de la komerca parto ebligas ankaŭ al Esperanto-volontuloj dediĉi pli da tempo al aktivadoj rilataj al Esperanto.

Se la jarkunsido voĉdonos favore al ĉi tiu vojo, ĝia efektivigo postulos plurajn jarojn kaj postulos la aprobon de postaj GAOj.

Argumento kontraŭ:

Multe da energio estas uzata por trovi novajn klientojn, kiuj luas la kastelon dum la labortagoj, sed tio ĉi ne estas necesa: per la kursoj kaj semajnfinaj luoj, ni jam bonhavas grandan profiton kaj la unuaj rezultoj de tiuj luoj dum la labortagoj estas ja ne malgravaj, sed malaltaj (malpli ol 10% de la spezo) kompare kun tio, kion necesus por profesiigi la mastrumadon de kastelo malfermita ĉiutage (plialtigo de salajrokostoj je almenaŭ 100 000 € jare).

Anstataŭigi volontulojn per dungitoj estus tre grava ŝanĝo, kiun ni ne povus atingi per la modestaj rimedoj de niaj labortagaj luoj. Same kiel la planitaj plibonigaj konstruoj. Ĉi tio postulus eksteran investon, kaj ni ne plu estus mastroj de la societo. Verŝajne investantoj ne interesiĝus pri Esperanto,...

Ni iom post iom faras la plej necesajn laborojn: tegmentoj, konekto al la kloako, baldaŭ la fenestroj ktp... Plibonigi komforton ne havus nur avantaĝojn: ĝi reduktus la nombron da litoj, ĝi eble postulus fermi la kastelon por gravaj internaj laboroj, tio plialtigus prezojn kaj senigus nin de la nunaj klientoj, kiuj venas, ĉar la prezoj estas por ili akcepteblaj...

La prioritato estas optimumigi la mastrumadon de la societo per allogo kaj trejnado de volontuloj kaj distribuado de taskoj. La akceptado de volontuloj estas plibonigenda tasko. Ne estas neeble subkontrakti iujn taskojn, sed ĉi tio ne nepre signifas dungi salajraton. La problemo de permanentado ankoraŭ ne estas solvita, sed ĝi estos des pli malfacile solvebla, se ni pliigos la nombron de luoj.


12) PROGRAMO en 2024

- 12 - 21 aprilo staĝo Printempas, intensaj kursoj kaj parto de KER-ekzameno
- 21 - 26 aprilo Korusa kunveno de Interkant kaj BEMI-semajno
- 30 junio - 05 julio Verda Naturisma Semajno
- 05 - 15 julio Maratona Esperanto-kurso kaj Konferenco IEK
- 15 - 25 julio Interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj
- 06 - 16 aŭgusto Someras kaj Festa Semajno por infanoj kaj familioj
- 17 - 25 aŭgusto Naskiĝrevena festo de esperantistoj
- 17 - 24 oktobro Semajno de esperantistaj biciklistoj
- 20 - 30 oktobrov Staĝo Aŭtunas kaj korusa kunveno de Interkant

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo ĉe: gresillon.org/agendo kaj: gresillon.org/aligho
- rete al: kastelo@gresillon.org aŭ gresillon@gmail.com
- telefone al: +33-2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo) aŭ +33-6 51 24 24 23 (Bert)
- poŝte al: MCE / Schumann, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo bezonas vian helpon! Dankon pro aliĝo kaj aligo de viaj amikoj.



VIRTUALA KONEKTO AL LA JARKUNSIDO 2024

Vi povos virtuale partopreni la jarkunsidon per tiu ĉi ligilo:

<https://us06web.zoom.us/j/84570855874?pwd=QaKYqkvswddnZ7hPAAtIRasUWK6TZC.1>

Se pasvorto estos postulata, tiu ĉi estas **zamenhof** tute minuskle.

La virtuala atendsalono malfermiĝos je 08h50.

Ĉiu partoprenanto klare notu sian nomon en la parametroj de Zoom.

Se vi ne havos retaliron, vi povos telefoni al la jena numero:

(el Francujo) **01 70 37 97 29**

kaj poste tajpi la identigilon de la kunveno: **8457 0855 874 #**.

Ekster Francio: trovu vian telefonnumeron en: <https://us06web.zoom.us/j/84570855874?pwd=QaKYqkvswddnZ7hPAAtIRasUWK6TZC.1>

Anoncu voĉe sian nomon.

Atentu ke la administranto povos malŝalti vian mikrofonon se ĝi kaŭzos tro da bruoj, vi mem povos reŝalti kaj malŝalti vian mikrofonon premante ***6**. Eblos ankaŭ "mansigni" al la administranto de la kunsido per ***9**: tio aperigos indikon videblan de la administranto.

VOĈDONO KAJ VOĈDONILO

La voĉdonoj okazos precipe rete per la retejo [balotilo.org](https://www.balotilo.org), antaŭ, dum kaj post la jarkunsido ĝis dimanĉo noktomeze, tiel ke ĉiu povu kalkuli kun la jarkunsidaj debatoj en sia voĉdono. Vi povos modifi vian voĉdonon dum la kunsido kaj eĉ ĝis dimanĉo noktomeze. Ne okazos pliaj voĉdonoj dum la kunsido mem, do prokuroj ne necesos. Ĉiu societano ricevos de la retejo [balotilo.org](https://www.balotilo.org) retmesaĝon invitantan voĉdoni per individua ligilo.

Societano, kiu ne havas retadreson, ne povas aŭ ne deziras voĉdoni per la retejo [balotilo.org](https://www.balotilo.org), povos voĉdoni sendante (per papera aŭ reta poŝto) la ĉi-suban voĉdonilon, kondiĉe ke ĝi **alvenos plej malfrue ĵaŭdon, la 18an de aprilo**. Via papera voĉdonilo estos enkalkulita nur se vi ne voĉdonis pere de [balotilo.org](https://www.balotilo.org).

Enmetu vian voĉdonilon en anoniman koverteton kaj sendu tiun ĉi koverteton ene de alia koverto kun via nomo kaj la vorto "**VOĈDONO**" al la jena adreso:

Maison Culturelle de l'Espéranto - VOĈDONO
1310 route du Lude - Grésillon
49150 Baugé-en-Anjou
France

aŭ retmesaĝe al: elections@gresillon.org (se retmesaĝe, via voĉdono ne estos anonima).

VOĈDONILO por la statutaj decidoj kaj rezolucioj

BULLETIN des votes statutaires et résolutions

Por tiuj, kiuj ne voĉdonos rete per
Pour ceux qui ne votent pas électroniquement
par balotilo.org

marku unu kvadraton en ĉiu linio
Cochez une case par ligne,

Aprobo de la agadraporto 2023:
Approbation du rapport moral 2023 :

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

Aprobo de la financa raporto 2023:
Approbation du rapport financier 2023 :

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

Aprobo de la kontoj 2023:
Approbation des comptes 2023 :

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

Imputo de la profito 2023:
Affectation du résultat 2023 :

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

Kvitigo de la Komitato:
Quitus au Conseil d'Administration :

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

Aprobo de la rezolucio "profesiigo de la mastrumado de ludonj": Ĉu vi favoras intensigi ludonj de la kastelo dum la labortagoj kun la celo financi la profesiigon de ties mastrumado kaj la realigon de plibonigaj projektoj?
Approbation de la résolution "professionnalisation de la gestion locative" : Êtes-vous favorable à intensifier les locations du château en semaine dans le but de financer la professionnalisation de leur gestion et la réalisation de projets d'amélioration ?

POR
POUR

KONTRAŬ
CONTRE

SINDETENO
ABSTENTION

VOĈDONILO por la kandidatoj al la administra komitato

BULLETIN de vote pour les candidats au comité d'administration

Por tiuj, kiuj ne voĉdonos rete per
Pour ceux qui ne votent pas
électroniquement
par balotilo.org

Marku la kvadratojn laŭ via elekto,
ĝis kvin kvadratoj
Cochez les cases de votre choix,
jusqu'à cinq cases.

Pierre "Ŝtonĉjo"
SOUBOUROU

Francis
BOSCH

asocio
SAT-Amikaro

asocio
INOE

asocio
Interkant